


Eŭropa Bulteno

Aprilo 2018, Numero 180

PROJEKTO DE EEU »RAKONTOJ DE REMEMORO« FINIĜIS



La projekto de EEU, kiu estis financita de la programo Eŭropo por civitanoj de Eŭropa Komisiono (EACEA), oficiale finiĝis la 28-an de februaro 2018. La 30-an de aprilo 2018 EEU forsendis la finan raporton al la Plenuma agentejo por kulturo, edukado kaj audvidaĵoj en Bruselo. La celo de la projekto estis okaze de 25-jariĝo de la militoj en eksa Jugoslavio



rememori pri pli ol du milionoj rifuĝintoj kiuj devis forlasi siajn hejmojn pro la milito. Dum la projekto okazis ekspozicio kaj diskutoj kun tiuj eksrifuĝintoj, kiuj dume revenis al siaj hejmoj aŭ trovis novajn hejmojn en aliaj landoj al kiuj ili estis devigitaj fuĝi, sed ankaŭ kun aktualaj rifuĝintoj, kelkaj inter la miliono kiu atingis Eŭropon dum lastaj jaroj. La celo estis influi partoprenantojn de la projektaj eventoj ekhavi pozitivan bildon kaj


rilaton al rifuĝintoj, vidi ilin kiel personoj anstataŭ nur bildo kreita de media reprezento de rifuĝintoj, influanta ĉies percepton kaj montras rifuĝintojn kutime aŭ en negativa kunteksto aŭ, kiam temas pri pozitiva kunteksto, ofte kiel suferantojn. Nia deziro estis montri ke ili estas homoj kiuj travivis malbonon kaj nun nur deziras la rajton komenci novan, pli bonan vivon.

Rezultoj de la projekto estis tre bonaj. La slovena partnero Asocio por Eŭropa konscio preparis profesian fotoekspozicion pri rifuĝintoj. La ekspozicio enhavis 48 fotojn de 4 eŭropaj fotistoj kiuj fotis rifuĝintojn dum la milito en eksa Jugoslavio kaj dum lastaj kelkaj jaroj: Borut Kranjc (Slovenio), Imre Szabó (Serbio), Florian Rainer (Aŭstrio) kaj Istvan Bielik (Hungario). Kuratoro de la ekspozicio estis Matej Sitar el Slovenio, fotisto, redaktoro kaj eldonisto de artaj fotolibroj kaj membro de Asocio por eŭropa konscio. La ekspozicio estis prezentita en 5 urboj: Partizánske, Maribor, Berlino, Graz kaj Bad Radkersburg.



Krom organizo de la ekspozicio, ĉiu el la partneroj havis la devon organizi publikan diskuton kun rifuĝintoj aŭ pri tiurilataj temoj en sia urbo. Tiel okazis entute 4 diskutoj: E@I en Partizánske organizis la plej grandan diskuton, kiun enute partoprenis 270 mezlernejanoj el 3 urbaj mezlernejoj. Malpli grandaj diskutoj okazis en aliaj urboj por ĝenerala publiko: en Graz, Maribor kaj Berlino. Iom specifa estis la diskuto en Maribor, kie ne okazis diskuto kun rifuĝintoj, sed anstataŭe kun 3 fotistoj kaj ĵurnalistoj (du el ili prezentiĝis en la ekspozicio) pri media reprezento de rifuĝintoj kaj respondecado de fotistoj pri estiĝo de ĝeneraligita bildo pri rifuĝintoj. Eble la plej interesa kaj intima diskuto okazis en Berlino, kie la podian diskuton partoprenis du rifuĝintoj de Bosnio kaj unu el Sirio, nun loĝantaj en Berlino, kaj psikoterapistino kiu laboris kun rifuĝintoj jam dum la milito en eksa Jugoslavio kaj daŭre laboras kun aktualaj rifuĝintoj. Ŝi laboris ankaŭ kun ambaŭ Bosniaj partoprenantoj de la diskuto.

Krom ekspozicio kaj publikaj diskutoj en Aŭstrio kaj Slovenio okazis kromaj eventoj en lernejoj. En du lernejoj en landlimaj urboj Šentilj kaj Spielfeld-Strass estis organizita legado de la libro „Hotel Zagorje“ de kroata aŭtorino Ivana Bodrožić en kiu la aŭtorino priskribas sian vivon kiel rifuĝinto el vidpunkto de infano, kiu ŝi estis komence de milito en Kroatio. Entute sepdeko da 14-jaraj infanoj legis la libron kaj verkis eseojn pri temoj rilataj al temoj de



la libro. En la Aŭstra lernejo instruistoj decidis ne nur legigi la libron al infanoj, sed dediĉi la tutan jaran projektsemajnon al la milito en eksa Jugoslavio. Dum la projektsemajno en aprilo 2017 lernantoj okupiĝis pri la milito dum ĉiuj studhoroj pri geografio, historio kaj literaturo. Fine de la semajno Asocio por eŭropa konscio organizis viziton de du personoj el eksa Jugoslavio kiuj parolis pri siaj memoroj kaj al kiuj lernantoj povis starigi demandojn. Krome Maribora faka mezlernejo pri aspektigo paroprenis en la projekto. En komuna projekto instruistoj pri filmo kaj historio gvidis lernantojn kiuj produktis 3 filmojn kun intervjuoj kun rifuĝintoj el tri militoj kaj tempoj, kiuj nun loĝas en Maribor. Temis pri unu naŭdekjarulo kiu devis kun sia familio fuĝi el Slovenio en 1941 dum la dua mondmilito, unu mezaĝa virino kiu en 1992 fuĝis el Bosnio al Slovenio kaj du junaj rifuĝintoj kiuj en 2016 fuĝis de Irano al Slovenio. La filmoj estis eksterordinare interesaj kaj profesie faritaj kaj ili estis parto de la fotoekspozicio en Maribor.

Resume EEU en 2017 faris prezenton de la projekto en Freiburg. Nun ni atendas la respondon de EACEA pri la fina raporto kaj espereble la plenan pagon de la restantaj 60% de la subvencio.

Maja Tišljár

KONSILIO DE EŬROPAJ VERDAJ PARTIOJ KAJ ESPERANTO

La konsilio okazos la 19-an de majo kaj AVE partoprenos ĝin montrante Esperanton per informstando, dank' al Georges Sossois kaj Ronaldo Nobel, kaj eble iu kunlaboranto inter la Antverpenaj Esperantistoj. La konsilio okazos en la Elzenveld-Seminariejo, jen la retejo: <https://europeangreens.eu/antwerp2018>. Eble indas rememori pri nia kunagado por Esperanto & Verdaj Partioj ek de 1984: http://www.verduloj.org/welcome.htm#Verdul_Esper.

Manfred Westermayer

KONFERENCO PRI MULTLINGVISMO

La 26-an de aprilo mi partoprenis konferencon pri subteno al vasta multlingvismo kaj instruado de lingvoj (ne nur de la angla) en Slovakio. La konferencon organizis Ŝtata Pedagogia Instituto kaj Ministerio de Edukado. Partoprenis ĝin ankaŭ ambasadoroj de Francio kaj Germanio kaj direktoroj de la Franca Alianco kaj de la Goethe Instituto, kiel ankaŭ reprezentanto de Goethe Instituto el Munkeno.

Dum paŭzo mi sukcesis mallonge paroli kun ili ĉiuj pri lingvo-politika agado/eventoj organizitaj en Slovakio, kiel ankaŭ pri multlingvaj retaj projektoj por lingva lernado financitaj de la Europa Komisiono. Mi donis al ili pakajon da dokumentoj paperforme kaj promesis morgaŭ sendi dokumentojn ankaŭ elektronika formo.

Mi proponis al ili, se ili konsideros la dokumentojn interesaj, ke mi volonte renkontiĝus kun ili por prezenti al ili aldonajn klarigojn al la dokumentoj. Mi esperas, ke ili proponos al mi renkontiĝojn.

Jozef Reinart

EŬROPA UNIO BEZONAS KOMUNAN LINGVON

La franca sekcio de la movado Eŭropo Demokratio Esperanto, kiu deziras evoluigi la disvastigon de sia mesaĝo al la publiko, organizas konkurson de mallongaj filmetoj. Aliĝo estas senpaga. Via filmeto, kun maksimuma daŭro de 5 minutoj, provu reliefigi la valoron de Esperanto kompare kun Eŭropo kaj / aŭ demokratio. Ekzemploj de temoj, kiujn oni povus trakti: multaj lingvoj de Eŭropo kaj la neceso de neŭtrala komuna lingvo, diskriminacio kaŭzita de la misuzado de la angla, financa rezulto montrata en la raporto Grin, kiel permesi la aperon de "eŭropa identeco", facile lerni Esperanton, kio estas malĝusta en Eŭropa Unio kaj la solvo proponata, Kiel EU funkcias, sen Esperanto / kun Esperanto. La formo restas por via libera elekto: skeĉo, prezento, historio, karikaturo... Kreemo kaj originaleco determinos kriteriojn por la ĵurio. Ricevitaj filmetoj kun supraj temoj estos metitaj en nian EDE-France YouTube-kanalon. Por eniri la konkurson, la filmetoj devas esti ricevitaj antaŭ la 1-a de junio 2018. Ĵurio kunmetita duone el membroj de EDE kaj duone el volontuloj reprezentantaj la publikon vidos la la ricevitajn filmojn kaj elektos tri. Rezultoj estos anoncitaj en la Universala Kongreso en Lisbono (28-a de julio – 4-a de aŭgusto 2018) kaj la gajnantaj filmetoj estos montritaj dum la premio-proklamo. La gajnintoj ricevos: 1-a premio € 500, dua premio € 300, 3-a premio 200 €. Dosiero de anonco kun reguloj estas trovebla ĉi tie:

<http://www.europe2019.org/concoursvideos/>

EDE – Francio

RENKONTIĜO KUN DIREKTORO DE DELEGACIO DE EŬROPA KOMISIONO EN SLOVAKIO

Petro Balaž kaj mi havis renkontiĝon la 28-an de aprilo kun Ladislav Miko, direktoro de delegacio de EK en Slovakio kaj Emilia Andrejová, oficistino pri lingvaj aferoj kaj tradukoj.

Ni informis ilin pri riĉa lingvo-politika agado, eventoj kaj multlingvaj projektoj de E@I (financitaj de EK) en Slovakio ekde 2004 enkadre de la tutnacia diskutplatformo pri EU "Nacia Konvencio pri EU" kaj trandonis al ili dokumentojn paper- kaj retforme. Ni diris ke pere de ili Slovakio fariĝis modela lando en EU en antaŭenigo cele al malfermo de tuteŭropa diskuto pri lingvaj kaj kulturaj problemoj en EU kaj serĉado de egalrajtaj kaj efikaj solvoj por ĉiuj membro-ŝtatoj kaj iliaj civitanoj.



Ni informis ilin, ke Vytenis Andriukaitis (Litovio), Komisionano de EU, partoprenis kiel ĉefparolanto en la lingvo-politika konferenco de V4+ landoj en Nitro en julio 2016 enkadre la SK PRES en la Konsilio de EU kaj en la solena konferenco en Freiburgo en junio 2017 dediĉita al monda personeco de Ludovik Zamenhof, okaze de la 100-jara datreveno de lia morto. Ni aldonis, ke Andriukaitis faris paroladojn en Esperanto. Ni diris, ke komisionano Andriukaitis havas klaran vizion kion bezonas EU en aktuala krizo kaj ke

esenca estas bezono solvi egalrajte kaj juste lingvajn kaj kulturajn problemojn en EU kaj eviti altajn lingvajn obstaklojn/barojn, kiuj malpermesas al 90% da civitanoj egalarajte komuniki kaj pere de tio partopreni en la eŭropa integriĝo. Ili ambaŭ estis agrable surprizitaj pri la informo, ke komisionano Andriukaitis parolis en Nitro kaj Freiburgo en Esperanto. Direktoro Miko diris, ke li konas tre bone komisionanon Andriukaitis, kiu estas lia amiko. Miko, kiel ĝenerala vicdirektoro por sekura nutraĵo en la EK antaŭ ol estis postenita en Bratislavo, havis eminentan kunlaboron kun Andriukaitis. Miko diris, ke Andriukaitis estas eminenta persono, viziulo, havas alian pensmanieron ol aliaj komisionanoj, politikistoj kaj ĉefrepresentantoj de EU institucioj. Li simple ne apartenas/taŭgas al ili.

Miko kaj Andrejová pozitive taksis nian lingvo-politikan agadon, eventojn kaj projektojn kaj montris intereson kunlabori kun ni (organizantoj) en preparado de "Renkontiĝo de poliglotoj" kaj "LingvaFest" en la Ekonomia Universitato en Bratislavo. Ni petis ilin helpi al ni interveni al komisionano Navracsics, ke li nomumu sian anstataŭanton por la "Renkontiĝo de Poliglotoj" kaj seminario kun poliglotoj pri novigaj metodoj en lingvo-lernado. Ni esperas, ke Miko sukcesos konvinki Navracsics kaj nomumos sian anstataŭanton por la renkontiĝo en Bratislavo.

Tiu ĉi pozitiva renkontiĝo donas al ni grandan esperon pri efika, noviga kaj sukcesa kunlaboro kun ili en lingvo-politikaj eventoj kaj projektoj ĉijare kaj en estonteco.

Jozef Reinart

LINGVA FESTIVALO EN OOSTENDE LA 28-AN DE APRILO 2018

Tiu unua eksperimenta projekto celis speciale kapti la atenton de la urbaj instancoj pri pli bona integriĝo de ostendaj migrantoj. Efektive tiuj grupoj restas inter si. Ili ja organizas festojn kaj renkontiĝojn, sed invitas ĉefe nur samlandanojn al tiuj eventoj. Esperanto puŝas al aliaj celoj: paroli kun alilandanoj kaj malkovri ilian kulturon. Niaj Universalaj Kongresoj ebligas tian malkovron en reciproka respekto. Do, kial ne klopodi renkonti alilandanojn kiuj loĝas en nia urbo? MARO signifas Multiculturele AdviesRaad Oostende (Multkultura Konsilanta Organo Oostende).

https://www.oostende.be/file_uploads/180988.pdf?sc=AB53F4F401AEE7943C981E5484218B51.



En Oostende loĝas pli ol 120 diversaj naciecoj. Renkonti kelkajn de tiuj alilandanoj ne estas facila tasko. La Konko (ostenda sekcio de Flandra Esperanto-Ligo) aliĝis al MARO kaj tiel havis eblecon partopreni en kelkaj kunvenoj de MARO. Mi regule ĉeestis iliajn kunvenojn kaj parolis pri la celoj de Esperanto. Bedaŭrinde neniu intencis lerni la lingvon. Ili jam havas sufiĉe da peno por lerni la nederlandan!

Ni devis serĉi alian manieron de kunlaboro. Kiam en oktobro 2016 Dennis Keefe prezentis en Oostende sian prelegon pri lingva festivalo ni komencis cerbumi kiel organizi la saman eventon. Estis jam multaj kursoj kaj iniciatoj pri fremdaj lingvoj kaj ni konstatis ke la migrantoj tute ne sekvis tiujn aranĝojn. Tiam ni havis alian ideon: ĉu la migrantoj ŝatas prezenti siajn lingvojn al la ostenda publiko? Ili miris kaj dubis. Neniu antaŭe okazis io tia! Nun ni havis alian taskon: konvinki la migrantojn (kelkaj apenaŭ parolas la nederlandan) ke estas unika ŝanco de renkontiĝo kun la ostendanoj por prezenti siajn kulturon, tradiciojn kaj lingvojn. Oni ne povas imagi la paciencon kaj daŭran insiston por finfine akordiĝi al la kunlaboro.

Alia problemo estis trovi allogan lokon por la organizado de la unua lingva festivalo en Oostende. Ni bonŝancis havi bonajn rilatojn kun homoj kiuj povis influi al pozitiva rezulto. La prestiĝa Onze-Lieve-Vrouwe-College (Kolegio de Nia-Sinjorino) akceptis lokigi la eventon.

Nur fine de 2017 ni povis fiksi la daton: 28-a de aprilo 2018. Poste ni regule klopodis renkonti personojn kiuj iam antaŭe promesis sian kunlaboron. Ĝis du tagoj antaŭ la 28-a ni ankoraŭ ne certis pri pluraj gvidantoj. Al telefon Alvoko respondis nur aŭtomata respondilo, retmesaĝoj ne ricevis respondojn...

Miraklo: la 28-an de aprilo ni povis prezenti jenajn lingvojn: la armenan, la hispanan, la kikongan, la lingvon el Kenio: kukuyu, la lingalan, la nepalan, la lingvon el Somalio kaj kompreneble Esperanton! Lastmomente gvidantoj de la araba kaj de la kurda ne aperis. La kolegio metis al nia dispozo ses belajn klasojn kun tabuloj, projekciiloj kaj konekto al interreto. La plej spertaj gvidantoj prezentis du fojojn sian lingvon, por la novuloj unu fojo sufiĉis.

En la klaso pri Esperanto Anne Brabant, prezidantino de La konko uzis filmeton de Bart Demeyere »La Ŝalmisto de Hamelin« pri kio homoj tre kontentis:

<https://www.youtube.com/watch?v=fLq5ps5VS-c&list=PLGpdMtPec0ih0OcExibaEazxNqDLiGHT3>

La urbestro kaj du skabenoj vizitis nin. Ili miris pri tiu nova maniero de kunlaboro kun la migrantoj kaj sugestis ke ni certe rekomencu la venontan jaron!

Sed kio plej gravas? La taksado de la lernantoj. Ĉiuj, sen ekcepto, laŭdis la aferon kaj eĉ amuziĝis dum tiuj prezentadoj, ĉu ĉe la spertaj gvidantoj ĉu ĉe la aliaj, novaj. Vere estis tute alia maniero de interkonatiĝo kun nekonataj lingvoj kaj kulturoj.

Ni arde penis por realigi tiun lingvan festivalon, kaj timis ĝis la lasta momento, ne sciante kiel evoluos la evento.

Rezulto: granda sukceso kaj ĉe la partoprenantoj kaj ĉe la vizitantoj. Kaj la plej pozitiva rezulto estis la konvinko de la urbestro kaj de la skabenoj: Esperanto ne estas nur lingvo, ĝi formas la ponton inter homoj kun respekto kaj toleremo de ĉies kulturo kaj lingvo!

Flory Witdoeckt

P.S. Jam la saman vesperon venis la reagoj de kelkaj esperantistoj el aliaj urboj:

- Ni gaje aplaudis kun la multkultura koruso Matondo, kaj poste tre atente aŭskultis la nepalan lingvon. Gratulon!
- En kelkaj monatoj vi realigis grandajn paŝojn: konstrui ponton al aliaj kulturoj kaj montri ke Esperanto vere vivas. Ni sekvis la lingalan kaj la kikongan: perfekta prezentado!
- Vi faris ĉion eblan kun entuziasmo; gratulon! Ni sekvis la hispanan kaj la lingalan kaj ni estas ege kontentaj.
- Dankon kaj gratulon! Ni sekvis diligente la armenan.

EN GREZILJONO OKAZIS LA UNUA KER-SESIO DE 2018

Per la ekzamenoj la 27an kaj 28an de aprilo, en la kastelo Greziljono, en Francio komenciĝis la KER-sezono de 2018. Mi aldonu ke ĝis nun estis petitaj ekzamenoj en 29 urboj. En Greziljono post preparsemajna programo ekzameniĝis 10 kandidatoj je tri niveloj. Inter ili estis ne nur francoj, sed kandidatoj ankaŭ el Svislando, Nederlando kaj Britio. En la kastelo, krom la skriba ekzameno, eblis trapasi ankaŭ la parolan parton. Danke al la ĉeesto de rajtigita ekzamenanto François Lo Jacomo kaj skajpa kontaktiĝo kun Katalin Kovats el Nederlando 8 personoj profitis el tiu eblo.



La skribajn kaj aŭskultajn ekzamenpartojn gvidis Christophe Chazarein kaj Marion Quenut. En la aliĝoj kaj praktikaj partoj helpis Jannick Huet.

Menciendas, ke tiu ĉi estis la 7a fojo kiam okazis KER-ekzameno en Greziljono. Gratulojn kaj dankojn al la lokaj kunlaborintoj. Se iu el la legantoj ekhavis emon je ekzameniĝo en unu el la ekzamenlokoj, jen la [paĝo kun la aliĝebloj](#).

DUA PARTO DE LA LIBRO »IDENTEKOJ«

II. Homo kiel individuo kaj kiel socia estaĵo

Kibernetiko klarigas la naturon de la homo tiel, ke la bazaj funkcioj laŭ kiuj la homo agas, samkiel ĉe ĉiuj aliaj vivestaĵoj okazadas sur la unuaj kvar niveloj plene subkonscie. La unua nivelo realiĝas pro demando de ekzisto aŭ neekzisto de ekstera aŭ interna forto, la dua nivelo rilatas al demando de direkto (spaco), la tria al la demando de distingo inter ago direktita al unuopulo kiel organismo (ego) aŭ kiel socia estaĵo (alter) kaj la kvara estas demando pri rapideco (tempo). Nur en la kazo ke la rapideco ne estas granda malfermiĝas la homa konscio kaj tiam je pliaj niveloj stariĝas demandoj kiujn oni konscie klopodas respondi.

Sur la tria subkonscia nivelo do solviĝas la demando ego/alter. Senkonsidere pri tio ĉu temas pri ekstera aŭ interna forto (iu forto el ekstero aŭ mi kiel forto), stariĝas la demando ĉu tiu forto agas al la subjekto (en nia kazo al la homo) kiel al individuo aŭ kiel al socia estaĵo. Tion eblas klarigi per fenomenoj en la naturo. La subjekto (persono) estas kiel atomo: li/ĝi estas

strukturo per si mem (egoo, individuo), sed tiu atomo estas parto de molekulo en kiu li/ĝi havas certan rolon kaj tiu molekulo same havas certan strukturon. La atomo ene de molekulo estas sub la influo de molekularaj fortoj, kiuj ne permesas al ĝi aktivi kiel individuo sed nur kiel parto de la molekulo en kiu ĝi havas certajn funkciojn.

La homo estas do unuflanke individuo, kiu agas baze de la propra strukturo (korpo kaj cerbo, kiu administras la korpon). Li posedas emoci-racian strukturon kiu helpas lin elturniĝi en la mondo kaj por realigi la bazan celon: kiel egoo, kiel individuo vivi laŭeble longe. Tio troviĝas en la genetika plano.

Aliflanke en la genoj estas planoj ankaŭ de la paralela emoci-racia strukturo, kiu aktivigas kiam la individuo ne estas egoo, sed »altero«, socia estaĵo, ero de grupo. Do, kiam ne estas endanĝerigita li individue sed en danĝero troviĝas aliulo el lia grupo aŭ la tuta grupo. Tiam la reagoj estas komplete aliaj ol en la unua kazo. Ni montru per ekzemplo: Homo kiel individuo klopodas defendi sian organismon kaj li evitas danĝerojn por sia organismo por vivi laŭeble longe. Se io lin endanĝerigos, li klopodos forkuri aŭ batali, se li taksos la endanĝeriganton pli malforta. Do li sekurigos sin mem kaj kondutos egoisme, kiel oni kutime diras. Sed tiun vorton (egoismo) ni ne rajtas kompreni en kutima negativa senco. Se li ne agus tiel, li ne vivus tre longe. Ĉiu individuo ja troviĝas senĉese antaŭ defioj kaj danĝeroj kaj li devas esti konstante singarda (se li ne atentus pri si mem jam post kelkaj minutoj li estus mortigita en trafiko). Do, tiu ego(ism)a emoci-racia strukturo, aktivanta aŭtonomie kaj sen homa konscio (ni ekkonscias pri ĝi nur post kiam ni jam reagis), defendas nin kiel unuopulojn, kiel individuojn.

Sed kiam estas en danĝero alia persono de grupo al kiu la individuo apartenas (ekz. membro de la familio: filo, filino aŭ edzino) la homo provos sen pripenso defendi lin/sin, eĉ se tio signifas ke tiam li estos eble vundita aŭ eĉ mortigita. La subkonscio de la individuo tiukaze agas kadre de la genstrukturo de grupano (socia estaĵo) kaj okazas reagoj komplete inversaj ol tiuj kiuj okazas kiam la homo agas kiel individuo. Kiel individuo li ne permesos esti damaĝita aŭ mortigita, kiel grupmembro li subite agas komplete inverse.

Oni devas kompreni ke en ambaŭ situacioj ni aplikas kaj la emocian kaj la racian reagaparaton sed diversmaniere. (Vidu en: Zlatko Tišljarić: „Ekzistado, kibernetika kompreno de la mondo«, „Existence – cybernetic explanation of the world“)

La celo de ĉi tiu artikolo estas priskribi kiel la homo agas kiel grupestaĵo (altero). Kiel homoj aktivigas kiel individuoj pristudas antaŭ ĉio medicino kaj psikologio, kaj kiel individuo agas kiel grupestaĵo (sociulo), do kiam li estas sociero) studas sociologio kaj socipsikologio. Ankaŭ la socian aktivadon (altruismon) ni ne rajtas egaligi kun la pozitiva signifo kiun tiu vorto havas en la ĉiutaga nuna kompreno. Kiel socia estaĵo homo estas nome unuflanke preta realigi heroaĵojn defendante la proprajn grupojn aŭ aliulojn en ili, sed aliflanke teruraĵojn kontraŭ aliuloj kiujn ni opinias malamikoj. Sekve ankaŭ la altruismo samkiel egoismo havas kaj pozitivajn kaj negativajn aspektojn.

Tiusence oni devas klare distingi la du statojn de la homo kaj lia agado, kiuj daŭre ŝanĝiĝas, li troviĝas nun en la stato de altruismo, nun en tiu de egoismo kaj tio konstante interŝanĝiĝadas. Ion oni devas krome scii. La homo estas kaj individuo kaj socia estaĵo, sed neniam samtempe. Kiam li estas en unu stato, li ne estas en la alia kaj inverse. Kaj la tutan vivon li daŭre transiras el unu en la alian staton.

Kiel ekzemplo ni rigardu iom da horoj en la vivo:

Ivo sidas ĉe la tablo vespermanĝante (li estas en egoa stato kontentigante siajn bezonojn pri manĝo). Subite li aŭdas krion de sia edzino el la kuirejo. Li eksaltas senpense (eble lia edzino grave vundiĝis kaj bezonas lian helpon). La stato de egoo subite ĉesis (bezono pri manĝo) kaj transiris al stato de altero (neceso helpi la edzinon). Kiam li konstatas ke okazis nenio grava, li reiras al la vespermanĝo (revenante al la stato de egoo). Li aŭskultas letevidajn novaĵojn. Iu fremda ŝtatisto deklaras ke tio kion faris la registaro de la ŝtato de Ivo estas erara. Ivo tuj koncentriĝas al la televido, ĉesas manĝi kaj proksimiĝas al la televidilo (kiel ano de sia popolo, kiun ofendis la fremda ŝtatisto, la egoan staton li ŝanĝis al la altera). Li koleras, forgesas siajn manĝbezonojn kaj pensadas pri tio kiel tiu ŝtatisto estas impertinenta kaj kial li faras tion. Sekvas en la novaĵoj negravaj temoj. Li rememoras ke li ne finis vespermanĝon kaj reiras al la tablo. Komenciĝis vespera televidfilmo. Li estas scivola (egoa stato pro amuziĝbezono) kaj li ekrigardas la filmon. Li sekvas iun filmokazadon en kiu iu grupo batalas kontraŭ alia kiu por ĝi estas danĝera. Baldaŭ li en siaj sentoj egaliĝas kun la »bona« grupo, iĝante ties membro (mallonga identeco dum la filmdaŭro). Li kunsentas kun »siaj« grupanoj (sentas empatation), kun siaj grupanoj li koleras, do, vivas en stato de altero kiel membro de en si nove kreita grupidenteco. Subite li sentas ke li bezonegas pisi kaj lia altero ŝanĝiĝas al egoo (kontentigi bezonon) kaj li iras al necesejo. Li ekmemoras ke li promesis al la filino diri ke li ion por ŝi faris. Tuj li ŝanĝas sian staton de egoo al altero (sento de komuneco kun la filino), kaj telefonas al ŝi por diri novaĵon. Tiam li sidiĝas por ripozi (egoa stato), sed aŭdas novaĵon ke lia loka futbalteamo venkis. Li forgesas la ripozadon kaj eksaltas pro ĝojo (stato altera - apartensento al sia loka komunumo, urbo) »ĉar ni venkis tiujn mizerajn rivalojn el alia urbo«, li pensas. Tiam li aŭdas ke teamo futbala el alia urbo de la propra ŝtato perdis matĉon kontraŭ iu klubo de alia ŝtato, Ĉi-foje li malĝojas, ĉar pro tio estiĝis altera stato de nacia identeco, ja en tiu momemnto la teamo el alia urbo de lia nacio reprezentas lian nacian apartenon.

Tiel ni funkcias konstante. Daŭre ni transiras el stato de individuo en staton de socia estaĵo kaj reen, plene subkonscie.

Kiel dirite, ĉiu unuopulo havas multegajn diversajn grupidentecojn kaj samkiel neniam estas eble esti samtempe en ambaŭ statoj (tiu de egoo kaj de altero) samtiel ne estas eble samtempe esti en stato de pluraj el diversaj grupidentecoj. Ni estas ĉiam nur en unu, en tiu kiu momente estas en danĝero. Kiam estas endanĝerigita mia edzino, ne gravas por mi mia loka, nacia aŭ religia identeco, sed nur la familia. Kiam mi estas spektanta futbalmatĉon, mi ne pensas pri la edzino aŭ infanoj sed nur pri la rezulto de la matĉo, ĉar tiam estas en danĝero mia loka aŭ nacia identeco, ne la familia.

Zlatko Tišljarić

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de aprilo 2018

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Maja Tišljár, Jozef Reinbart, Katalin Kováts, Flory Witdoeckt, Manfred Westermayer, EDE Francio

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

